



Bulletin mensuel de la **FÉDÉRATION DES GROUPES ESPERANTISTES DU NORD DE LA FRANCE**
(NORD, PAS-DE-CALAIS, SOMME)

Redaktanto kaj Administranto

Gérant : Paul BENOIT,

72, Avenue G. Malo, en **Malo-les-Bains** (Francujo)

Chèque Postal (Poŝtekkonto) : 45.745 Lille

Abono ĝis fino 1936 : 6 francaj frankoj

Senpage por la senlaboruloj

Adreso por Belgujo : Grand Hôtel **Oostduinkerke**

Paul Benoit, Poŝt ĉekkonto : 54.574 Bruxelles



13^{an} & 14^{an} de Junio 1936: Federacia Kongreso en HAUTMONT

(AL LA LEGANTOJ)

Aux Lecteurs

Nombreux sont nos abonnés qui ont entendu l'appel de notre précédent N° et qui renouvelant immédiatement leur abonnement ont facilité notre travail. Merci ! Merci surtout pour les appréciations qu'ils ont bien voulu y joindre et pour les quelques francs ajoutés pour assurer cette année encore l'abonnement gratuit des samideanoj chômeurs.

Notre cordial salut à tous nos nouveaux lecteurs ! qui seront bientôt sans doute des collaborateurs. Notre organe est géré sur la base de l'absence de bénéfice, sans rétribution ni subvention ; aussi ceux qui assurent chaque mois gracieusement la tâche ingrate de la rédaction, administration expédition, ont le droit d'exiger plus que le seul paiement de l'abonnement mais des communiqués des articles des critiques constructives...

Ce bulletin doit être une œuvre collective, chacun aidant si peu que ce soit à le rendre plus vivant, plus varié.

Faites-nous part souvent de vos désirs dont nous tiendrons le plus grand compte, mais souvenez-vous qu'il existe d'excellentes revues internationales qui ne coûtent que 10 ou 20 fr. (mensuelles) ou 48 fr. (hebdomadaires) et que tous ceux qui peuvent économiser cette somme ont le devoir de s'y abonner, elles sont faites pour eux. Norda Gazeto n'est qu'un bulletin...

Etant en grande partie rédigé en

Esperanto il exigera de vous un petit effort, seul moyen de vous faire progresser.

Débutants, soulignez les mots difficiles et soumettez-les nous ou à votre professeur ; dans quelques semaines vous comprendrez tout.

Etant rédigt en E., il pourra intéresser votre correspondant étranger avec qui vous pourrez l'échanger contre l'une des très intéressantes revues étrangères.

Enfin en cas de plainte, par exemple pour retard (chaque N° paraît vers le 1^{er} du mois) ne vous adressez pas à d'autres qu'à nous.

N. G.

BONDEZIROJ

Estas kutimo ke oni esprimu al siaj geamikoj, kiam nova jaro komencigas, ĉiuspecajn bondezirojn.

Mi do sendas, per tiuj-ĉi vortoj, al ĉiuj anoj de nia nordfederacia familio, miajn plej korajn dezirojn. Al ĉiuj mi deziras, por ili kaj por iliaj familioj, sanon, feliĉon kaj pacon.

Kuragon ankaŭ mi deziras al vi, karaj kunbatalantoj, por daŭrigi vian propagandan laboron kaj por vigle antaŭenpuŝi nian verd stelumitan ĉaron. Semu kaj semu ! Estas necese ke novaj adeptoj konstante alvenu en niajn vicajn por plifortigi nian movadon kaj ankaŭ por anstataŭi tiujn, kiuj, bedaŭrinde, de tempo al tempo, forlasas nin... ne nur pro morto, sed pro diversmotivaj « malpultoj ».

Mi deziras ke la paco regu super la mondo, sed ankaŭ inter ni.

En la estinta tempo, la esperantistaro multe disputis pri lingvaj demandoj, pri ŝanĝoj aŭ plibonigoj en nia lingvo. Sed, ĉar oni konstatis ke, tia kia ĝi estas, spite de siaj neperfektaĵoj (?), Esperanto estas plej taŭga ilo, oni fine komprenis ke estas pli bone — laŭ la konata alegorio de nia bona majstro Th. Carl — **uzi nian fosilon ol perdi tempon kritikante ĝian formon.**

En la estanta tempo, la ario ŝanĝiĝis. Oni ankoraŭ tro ofte diskulas, sed pri alia temo : Ĉu Esperanto estas praktika aŭ ideala afero ? Ni konsideru ke ĝi povas esti ambaŭ, **Celo aŭ rimodo**, nia lingvo vivas kaj liveras al ni mirindajn eblecojn. **En niaj grupoj, ni laboru nur por Esperanto, neŭtrale, tolereme, akceptante ĉiujn bonvolemlulojn. Ekster niaj grupoj, ni konservu niajn preferojn kaj opiniojn, kaj, en ĉiujn de ni vizitataj randoj, en politikaj, en religiaj, en metiaj, k.t.p., ni laboru por diskonigi nian lingvon. Jen la taŭga formulo !**

Kiom mi estas feliĉa kaj fiera, se mi povas iam ekstarl kaj diri : « Mi parolas en la nomo de ĉiuj ĝesperantistoj en Norda Francujo... » Kaj — ĉar mia persono ĉi-tie tute ne gravas — kiom da forto donus al nia movado tia deklaro pri unuigo !

Atendante la realigon de tiu bela

**Ciuj al LENS
la 2^{an} de Februaro
por la federacia
kunveno !**

revo, ni propagandu kuraĝe, sen ace, ĉiutage. N'a federacio enhavis, fine de 1935-a, 792 membrojn. Ni nepre devas esti almenaŭ mil, dum la 1936-a. Mi kalkulas je vi ĉiuj, karaj gefederaciuloj, por venke atingi tiun celon!

Albéric HUMEZ.

DERNIÈRE HEURE

(Informations reçues le 20)

DOUAI et LENS

La séance inaugurale du cours de Mlle Saxl aura lieu le lundi 17 février prochain, à 20 h. 30, dans la salle basse de l'Hôtel de Ville, sous la présidence de M. le maire de Douai. Pour renseignements, s'adresser les mercredis, à 20 h. 30, aux réunions du Groupe Espérantiste de Douai, 5, rue Fortier, ou chez le secrétaire du groupe, 13 ter, rue Morel.

Pour le cours de Lens, qui aura lieu simultanément avec celui de Douai et dans les mêmes conditions, s'adresser à M. K. éber Vandevorde, 36, rue François Gauthier, à Lens.

HAUTMONT

Samedi soir 25 Janvier, conférence de M. Masselier.

DUNKERQUE

Samedi 25 à 18 h. 45 et dimanche 26 à 10 h. 15, à l'Hôtel de Ville, causeries par M. Centnersiver.

Mardi 28 à 18 h. 45 même local, Assemblée Générale annuelle.

RADIO

LILLE

Chaque dimanche matin de 9 h. 15 à 9 h. 45 continue ses intéressantes émissions espérantistes. En janvier S-ro Thien y parla presque chaque fois, le 25, une causerie de M. Masselier. Le 16 ou le 22 février Fraùlino Saxl à la voix remarquablement radiophonique nous charmera tous.

Nous envoyer à la demande de notre ami Curuelle tout article pouvant convenir pour ces émissions qui seront bientôt audibles dans toute l'Europe.

Les articles pour chaque N° suivant devront nous parvenir pour le 10 du mois, ceux sur la vie des groupes le 15, seuls les articles très courts et urgents pourront exceptionnellement être acceptés le 20.

Vivo de la Grupoj

ARRAS

La ĉiusemajna kurso de S-ro Collot daŭrigas regule ĉiumarde je la 18 h. 30 en la komerca Cambro.

La grupo kunvenas ĉiam merkred: en sama loko je 20 h. 30. Vico da prelegoj okazis Finoj Lognon, de Saint-Jullien, Tyveyra kaj Collot, agrable, sprite, entuziasme raportis pri la XVII^e en Romo, la Krozado, la vizito al Vesuvo, Napoli, Palerme, Geneva, belaj albumoj kaj bildoj fondiris la mirigintajn ĉeestantojn, kiuj pri tia bela vojaĝo povas nun nur bedaŭri...

La loka grupo, kunlaborante kun societo « Amikoj de Polujo » aranĝos ekspozicion pri Arto en Polujo dum venonta februaro S-ro Centnersiver promesis prelegi ĉi-tie pri tiu amika lando, okaze de tiu ekspozicio.

ACHICOURT (P.-de-C.)

La urbertro disponigas al la Arrasanoj. Festan Ĉambron, kie okazis la 20an de Januaro publika prelego de S-ro Brunet pri esperanto, Sekvos rekla demonstracio la dimanĉon 26an kaj ĉiufmane matene okazos kurso, kiun bonvolas gvidi Fino de Saint-Jullien, por enskribo sin turni al S-ro Brunelle, sekretario de Mairie.

AIRAINES

Post la sukcesplena prelego de S-ro Thien nederlanda ĉe-profesoro oni malfermis kurson kiun gvidas S-ro Fréville lerninto de S-ino Delavigne el Longpré, 25 personoj sekvas regule tiun kurson.

BOULOGNE-SUR-MER

Dum 1936, la sindkato de iniciatoj (turisma oficejo) havos sekretarion scipovanta esperanton, por doni ĉiujn informojn cu parole, cu per letere al la multaj samideanoj kiuj trapasas aŭ vizitas Boulogne. Imitinda ekzemplo!

Vigla propagando de la grupo ĉe radio kaj ĉe la gazetaro Dukolona tre favora artikolo pri esperanto kaj pri la agado de la grupo de Boulogne « urbo de la unua universala kongreso » aperis en Petit Parisien, unu el la ĉefaj francaj tagjurnaloj.

La diversaj kursoj bone progresas.

CALAIS

Rezultatoj akiritaj dum 1935 dank' al helpo de kelkaj junaj samideanoj, kiuj multe klopodis.

1) Urbkonsilantaro esprimis deziron

favore al la enkonduko de E. o en la lernejojn.

2) S-ro Léon Vincent deputito aliĝis al la parlamenta esp. grupo prezidata de S-ro Maurice Rolland.

3) S-roj Perrin kaj Masson gvidas kursojn por komencantoj.

4) Ili gvidis demonstracian lecionon antaŭ ĉiuj prezidantoj de la societoj de laikaj lernejoj. Baldaŭ okazos nova kunveno kun la klarigo de la elementoj de la lingvo.

Dum 1936 S-ro Perrin intencas propagandis ĉe la dekretarioj de la urbo-domo en ĉiuj komunumoj de nia departemento. Ĝi estos la daŭrigo detiu de la pasinta jaro farita ĉe la lernejestroj.

Ankaŭ propagando ĉe aviadistoj pere la speciala numero de F. E.

DENAIN

La kastelo de la grupo enkasigis la 100 frankan subvencion oferitan de la Urbkonsilantaro. Depost la 1-a februaro la kursoj (unua kaj duagrada) okazos sur la subterelago de la urba teatro.

DOUCHY

Kurso ĉiulunde de la 18-a 30 ĝis la 20-a en la Muzik-ripetada Salono de la Urbodomo por 60 personoj.

Ĝi estas gvidata samtempe laŭ rekla kaj gramatika metodoj de S-ro R. Henry kaj J. Lebecque.

DUNKERQUE

La prelegoj de S-ro Benoit, pastro Kao, kaj de S-ro Lemaire el Hondtschoote (pri sia vojaĝo en Germanujo) kiuj okazis kiel kutime sentradukote tre interesis la novajn kaj malnovajn grupanojn.

La Zamenhofa festo bonege sukcesis, Plu ol ducent personoj vigle aplaudis al la preskaŭ nur esperantlingva programo.

Ankaŭ la kursoj kontentige daŭras. Detalojn vi povos legi el la ĉiutaga pri esperanta kroniko de Nord Maritime (loka ĵurnalo) kaj en la grupa bulleto « Antaŭen ».

Fine de januaro kaj dum februaro venos S-ro Cent' kiu prelegos kun lumbildoj pri la popola arto en Polujo (sabate vespere) kaj rakontos anekdotojn slavajn (dimanĉe matene).

Venos ankaŭ S-ro Emmanuelson el Boras (Svedlando) tre simpatia kaj farta samideano kiu prelegos pri sia lando.

JEUMONT

Tridek gelnantoj alskribigis al la kurso.

LOUROHES

Perfektiga kurso ĉiudimance de la 9-a ĝis la 10-a, ĝi estas regule vizitata de 10 ĝelernantoj.

Tuj poste okazas kurso por komenĉantoj, kiun ĉeestas trideko da lernantoj.

La ambaŭ kursoj estas gvidataj de S-ro Lebecque.

LOCS-EN-GHELLE (P.-de-G.)

La 22an de decembro sub la prezido de S-ro **Contart** direktoro de popollernejo, pli al 50 personoj ĉeestis la publikan demonstracion de S-ro Vandevuorde el Lens kiu gvidas komencanton kurson de la 5ade Januaro ĉiu dimanĉe matene de la 11a 12a en la « Ecole des garçons ».

LONGPRE-LES-CORPS-SAINTS

Le Conseil Municipal de cette ville au cours de sa dernière réunion, a voté un vœu demandant l'introduction de l'Espéranto dans les écoles.

LAON

La urba konsilantaro vodonis deziresprimon por instruo de Esperanto en ĉiuj lernejoj. Dum la venonta printempo estos aranĝata en Laon kongreso de la najbaraj esperantistaj grupoj.

LILLE, ROUBAIX, ARMENTIERES

Post intensa propagando, la kursoj estis inaŭgurataj en la urboj Lille, Roubaix, Armentières, kaj konsiderante la rezulton, oni povas esti tre kontentaj pro la esperanta enpenetriĝo en la iam forlasitaj urboj.

Speciale la Armentières urbo sajnus reviviĝi. Antaŭ la milito, la verda stepo estis tre kela sed ĝi mallumiĝis pro ĉi tiu bombafalo. La kurso nun enhavas 60 ĝelernantojn, viglajn pro bela entuziasmo.

Kune kun Roubaix, kiu kunvenigis preskaŭ 40 ĝelernantojn kaj 55 en la du kursoj en Lille, estas en tute ĉirkaŭ 155 komenĉantoj kiujn S-ro Thien aldonas pere de la Ĉseh metoda instruo.

Estus betege por ĉiuj urboj kaj urbejoj, kiuj povas kunvenigi 20, 25 lernantojn, havi Ĉseh profesoron, ĉar kvankam, oni povus kritiki la metodon je kelkaj detaloj, oni ne povas nei ĝian altrecon, ĝian vivon, ĝian ĉarmon, ĝi interesas, mirigas konvinkas, kaj ĝi progresigas la komencanton en la ĉarmplenan studon, samtempe kiel en la universalan ideon pri tutmonda familio.

En Lille la ĝelernantoj de la kurso

de S-ro Stuit havas la feliĉan favoron ĉiudimance profiti la sciencoplenajn lecionojn de la profesoro G. Waringhien kiu baldaŭ instruas la ĝelernantojn de S-ro Thien. Dume la prezidanto de la Grupo de Lille S-ro Chavet estas ankaŭ okupata pri kurso, vizitata de ire multaj studentoj de la lernejo de Artoj kaj Metioj.

(raporto verkita de lernanto *V. V. V.* de la kurso Stuit 1935).

MARCEUIL

S-ro Laloux havas 7 novajn ĝelernantojn la antaŭaj kunvenas, legas, korespondas kontentige. La grupo aranĝos festeton kun dancado la 16an de februaro.

QUAROUBLE

Sano Piette gvidas elementan kurson kun ĉirkaŭ 25 lernantoj. Grupo estos starigata.

VALENCIENNE-a regiono

S-ro Rémy sekretario de la grupo de la oficistoj estas nun soldato en Metz. Li propagandas inter siaj kolegoj kaj gvidas kurson kun 10 lernantoj en la kazerno.

Bedaŭrinde dum la foresto la grupejoj neve kreitaj en **Sebourg** kaj en **Bruay** estas mortigantaj.

Pri **Anzin** ni tre dezirus ricevi informojn.

WALLERS

La grupo aliĝis al la federacio. Ĝia prezidanto estas S-ro Monier Myrtil kaj sekretario S-ro P. Brassart, instruisto en Ecole Tuilerie.

Nekrologo

Ni ĵus eksciis pri la terura akcidento, kiu trafis nian samidenon Gilbert Gosselin, membron de la Anzin'a Esp. Grupo. Li estis mortigita de kontraŭbandista aŭtomobilo, kiam li revenis bicikle de sia laborejo kun sia amiko Audegond. Fervora esperantisto li kreis kun S-ro Audegond novajn grupojn kaj instruis Esp-on en Marly kaj en St-Sauve. La Komitato de la Nord-franca Federacio esprimas al lia patrino kaj al la grupo de Valencienna regiono siajn plej sincerajn kondolencojn pro la perdo de unu el la plej viglaj kaj plej sindonaj pioniroj de nia Movado.

"Vortoj de Zamenhof"

(Tro malmulte konata, eĉ inter la Esperantistoj, estas la nobla idealismo de la aŭtoro de la lingvo. Serio de artikoloj ĝin montras, laŭ propraj vortoj kaj skribaĵoj de Zamenhof).

« Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas : Ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj aŭ ĉu ĉiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj ! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencen ! Kiam via sankta homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ diversaj malhonestuloj ! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon alĝuiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis !

« Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiru la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj mureojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu cambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata, estas « esperantistoj ».

(Parolado en Londono, 1907)

A toutes demandes de renseignement joindre enveloppe adressée pour réponse. Merci !

Raporto pri la komitata kunveno en Denain la 22-an de Decembro 1935

1) Alvenis 19 leteroj kun senkulpiĝoj kaj kun sugestoj, proponoj k.t.p. de la jenaj gesamideanoj : F-ino Coléatic, S-ro Duchochois, Houzé, Alglave, D-ro Desmoulins, Petit (SFPE), Vandevoorde, Huin, F-ino Nelly Leconte, S-oj Curnelle, Brassart, Delavigne, Marcand, Prevost, Hulio, Brunel, Charlet, Canonne, S-ino Lotthé.

2) S-oj Humez kaj Cent prezentas kiel kandidaton por la elekto de federacia sekretario por la propagando ĉe la Instruistaro S-ro Raymond Marcand el Denain (adreso por korespondado : poste restante à Fournes (Nord)) Li sendis longan raporton pri sia ĝismuna agado. S-ro Humez proponas 100 fr. por la budĝeto de tiu fako. La komitato gratulas S-ro Marcand kaj petas lin daŭrigi sian viglan laboron.

S-ro Humez sciigas al ĉiuj pri la solvo de la miskompreno okazinta pro la rifuzo de la Esp. kursoj en la popollernejoj : post la klopodoj de la SFPE, la ministro nuligis la malfavoran dekretan.

(Tiu informo estas erara ; en pli posta letero de la 15a Januaro la S.F.P.E. konfesas ke ĝi esperas sed ne sukcesis ĝis nun, ĉtere tiu dekreto estas ne speciale kontraŭ E. sed kontraŭ ĉiuj vivantaj lingvoj. Red.)

3) S-ro Brunel pro manko de tempo ne povis akcepti ĝi tutregiono delegito de U.E.A.. Li proponas elekti iun malnovan izolulon. Ĉar ĉi afero estas tre grava S-ro Cent estas komisiata serĉi inter tiuj, taŭgan kandidaton.

4) Pri la elekto de sekretario por Izoluloj en la departemento Somme. Oni proponis la kandidatecon al S-ro Delavigne ; sed li rifuzis pro manko de tempo kaj starigis la demandon al la komitata kunveno de Amiens grupo. Tiu-ĉi decidis akcepti la taskon. Sekve : F-ino L. Duben, 165, rue Charles Dubois à Amiens okupiĝas de nun pri la izoluloj de Somme.

5) La rapida kresko de nia federacio kaŭzas grandan korespondlaboron al ties sekretario. Por plenumi ĝin li nepre bezonas havi skribmaŝinon. Ĉar niaj federaciaj monrimedoj ne ebligas ĝian aĉeton, oni alvokis la oferemajn amikojn. Unua respondis S-ino Lotthé el La Cappelle (Aisne) donacante al ĉi tiu celo 100 fr. la Konsilantaro de la

SFPE voĉdonis 100 frankan subvencian kaj la Arrasa grupo decidis donaci ankaŭ 100 fr. el la monsumo kiu restis post la Kongreso. En la lasta momento oni ricevis 20 fr. de F-ino N. L.

Ĝes-oj Humez post longaj klopodoj sukcesis trovi en Parizo bonegan okazajn preskaŭ novan skribmaŝinon por 300 frj. S-ro Cent, tute dankas ĉiujn supre-cititajn pro la helpo al la realigo de lia deziro.

6) La demando pri la rimedoj por konservi la lernintoj estas tre grava kaj oni ne havis sufiĉe da tempo por trastudi ĝin ĝisfunde. Ni starigas tiun demandon nun sed ni petas ĉiujn federaciajn (ankaŭ ĉiuj legantoj en-kaj ekster-landaj) bone pripensi tiun aferon kaj ellabori siajn sugestojn, proponojn kaj ideojn kaj sendi ilin al ni La temo estos prilaktata dum la venonta komitata kunveno en februaro. S-ro Houzé (Dunkerque) kiu estas unu el la plej kompetentaj proponas la jenajn rimedojn :

a) ĉiu havu kelkajn eksterlandajn korespondantojn.

b) instigi al la abono al revuoj en esperanto : La Praktiko-Kaj Nia Gazeto, kaj la grupo abonu al la Heroldo semajna.

c) vojaĝo al Arnhem, al eksterlanda Kongreso, al la federacia internacia kunveno (la kongreso en Hautmont kaj la Somera Perfektiga kurso dum Julio)

d) pruilo kaj aĉeto de interesaj libroj.

e) prelego de fremduloj en Esperanto.

f) festoj kaj ekskursoj.

g) rondirado de parto de la federacia ekspozicio inter la grupoj por prezenti ĝin dum la grupaj kunvenoj.

h) kantoj kaj sociaj ludoj Interesa diskuto komenciĝis jam sur la kolumnoj de Norda Gazeto per la artikolo de S-ro Cent, kaj estos daŭrigata (S-ro Alglave ankaŭ sendis interesan artikolon.

7) Pri la uzado de la esperanto dumonhoro el la radio-stacio Lille, skribis longan leteron S-ro Maurice Nogé, federacia radiodelegito.

Li proponas ke oni dediĉu almenaŭ 10 minutojn al malnovaj esperantoj diskonigi per radio esp. novaĵojn k.t.p.

Sekve de la alvokoj en Esperanto de la nova stacio Camphin tiu-ĉi ricevis esperantajn leterojn el 12 landoj. La direktoro de la stacio sendis dankle-

teron al ĉiuj esperantistoj kiuj skribis al la stacio.

S-ro Alglave radio-helposekretario parolas pri la sama temo. Li insiste petas ke ĉiuj federaciajn kiuj havas radio-aparaton aliĝu al « Radio-Club Espérantiste de France » kaj ke la grupoj aliĝu sian radio-delegiton. Sekve de ĉi alvoko la grupoj de Valenciennes, Anzin, Denain, Louvaches, Douai, Lens, St-Omer tuj pagis la kolizon por 1936. La aliaj bonvolu sendi ĝin (10 fr. jare) al S-ro M. Alglave, 150, rue Gréville-Voye en Blanc-Misseron (Nord).

8) Esperantista budo funkcias en la Komerca Foiro en Lille de la 4-a ĝis la 19-a de Aprilo 1936. La ĝenerala sekretario deĵoros tie sed li esperas ke la Lille'anoj multe helpos lin. Jam S-ro Mathieu, izolulo en Bousbecque promesis sian helpon.

9) La venonta komitata kunveno okazos en Lens la 2-an de februaro.

10) S-ro Deligny honora prezidanto de la Federacio eldonis « Histoire de la Fédération Esp. du Nord ». En la nomo de nia federacio S-ro Humez gratulas kaj dankas S-ron Deligny pro la utiliga libro Vidu detalojn en la antaŭ N° de N. G.)

Réunion Fédérale à Lens

— 2 Février 1936 —

Tous les esperantistes et sympathisants de la Fédération sont instamment invités à participer à cette réunion fédérale au cours de laquelle il sera tenu compte de la présence de débutants en ce début de saison. Chaque groupe recevra une circulaire détaillée. Pour tous renseignements éventuels écrire à M. K. Vandevoorde, 36, rue F. Gauthier, à Lens.

Programme :

Dès 9 h. 30, arrivée des participants dans la salle de la Justice de Paix de l'Hôtel de Ville.

À 10 h. précises réunion du Comité Fédéral (tous les groupes sont priés d'envoyer un représentant qualifié ou en cas d'empêchement absolu leur avis écrit).

Vers 12 h. visite de la Ville.

À 12 h. 30 repas en commun facultatif.

De 14 h. à 16 h. visite des installations des Mines de Lens.

Photo après la réunion.

Esperantista Tago en Denain

Okaze de la komitata kunveno de nia federacio, la grupo organizis dum la tuta tago diversajn arangojn por taŭge pasigi la tempon al la karaj gastoj inter kiuj estis: S-ro Deligny, honora prezidanto de la federacio, Ges-oj Humez, Fr-ino Barret, S-ro Max el Lens, S-ro Thien, nederlanda ĉe-instruisto kaj multaj aliaj anoj de esperantistaj grupoj de Valenciennes' a regiono.

La tuta antaŭtagmezo estis destinita al la laborkunsido de la federacia komitato, en kiu partogrenis ĉiuj gastoj.

Pli ol 40 gesamideanoj sidis ĉe la festena tablo kaj regalis sin per bongustaj nutraĵoj materialaj kaj moralaj. Ĉe la deserto unue parolis S-ro Gauvin, prezidanto de la Denain'a Esp. grupo. Li deziris bonvenon kaj ĝojan posttagmezon al la gastoj. Tre mallonge paroladis S-ro Humez, li dankis la aranĝintojn de la « Tago ». Poste deklamis S-ro Cent, siajn novjarajn bondezirojn kaj S-ro Thien rakontis pri la interesa sed neimilinda kutimo en iu nederlanda vilaĝo. S-oj G. Langlet kaj Audegond kantis esperanto-kantojn. Poste ĉiuj iris al la grandega prelegĉambro kie okazis la festeto. Ĉia programo estis tre varia kaj interesa; ĝi konsistis el kantoj, muzikludo, rakontado de anekdotoj kaj ŝercaĵoj deklamado de versaĵoj en Esperanto kaj en loka dialekto. La dua parto konsistis el esperantista teatraĵo ludita de 8 membroj de Denain'a grupo. Kantinte nian himnon « La Espero » ĉiuj disigis tre kontentaj pri la gaje kaj utile pasigita tago kun koro plena de espero ĝojo kaj ke spite de teruraj nuntempaj malfacilaĵoj, nia Afero ĉiam progresas.

Angulo de la edukistoj

Ni tre dezirus kunlaboranton por ĉiu tiu angulo.

En venonta N° ni publikigos interesan leteron de angla instruistino kiu instruas esperanton devige en sia klaso kun granda sukceso.

La instruista societo « Les Amis de l'École Nouvelle » kies komitato konsistas el niaj federacianoj kaj kies multaj anoj estas tre favoraj al Esperanto petas ke ni konigu ĝin al ĉiuj niaj federacianoj Bonvolu skribi al ĝia sekretario nia samideano P. Hulin, instituteur en Phalempin (Nord).

Federacia Kongreso en Hautmont

13a kaj 14a de junio 1936

Kelkaj bonaj novaĵoj.

— Ni povas jam anonci la partoprenon al nia kongreso de kelkaj eksterlandaj samideanoj. Inter tiuj amikaj, kiuj faros el nia regiona kongreso internacian kongreseton, ni citu almenaŭ nian tiel simpatian samideanon, S-ro Pastro Kao. Ni do kavos, eksterprograme, okaze de la diservo esperantan paroladon.

— Okaze de la ekskurso projektita en la pentrinda regiono nomita. Malgranda Norda Svisuja, la organizantoj preparas fotografan konkurson laŭ nova formulo, kun la helpo de la Iniciala Sindikato en Avesnes.

Rapidu sendi vian aliĝon al S-ro Marcel Cavier, 20, rue Aimé Collet, en Hautmont. Poŝtekonto: Lille 503-33. Vi povas ankoraŭ profiti, ĝis la fino de februaro, la rabatitan kotizon: 5 frankoj aŭstataŭ 10. Ne prokrastu...

Voco El Eksterlando

Jam du monatoj! Ho, kiel flugas la tempo. Jam du monatoj depost tiu bela dimanĉo, kiam ni vojaĝis en agrabla grupeto al Bruselo.

S-ro Mack, la vigla kaj afabla prezidanto de la Arasa grupo, estis nia gvidanto.

Kvankam ankoraŭ tre frue, la tago jam promesis sunlumon kaj ĝojon. Ankaŭ en nia grupeto bele kaj ĝoje lumis vizagoj, interŝanĝigis amikaj ridetoj.

Tamen, jes, tamen estis dolore adiaŭi gepatrojn. Ni ja intencis vojaĝis ne nur ĝis Bruselo kaj jam morgaŭ reveni. Pli for estis nia celo. Por kiom da tempo?

Post longa vojaĝo tra Belgujo Nederlando, kaj Germanujo, ni alvenis en Sasnitz, kie ni enŝipiĝis. Kvinhora vojaĝo atendis nin. Estis dumokte. Brilelis la steloj sed ankaŭ nigraj nuboj kunpeliĝis...

Baldaŭ ni vidis palajn vizagojn ĉirkaŭ ni Al tiuj viktimoj la vojaĝo certe ŝajnis tre longa. Kaj sendube ili ĝojis, kiam je la sesa, vidiĝis la bordo de Svedlando.

Jam de la ŝipo ni felis saluton, proplezura revido, al tiu interesa lando,

kiu postlasis agrablan memoron. Memoro pri nia Stokholma, vere Esperanta Kongreso en gastama lando de trankvilaj, bonkoraj gesamideanoj.

Trankvilo, jes, nin luj denove frapis tiu eeo de la svedoj. Ne malpli la komforton de la svedaj vagonaroj ni rimarkis. Restis ankoraŭ seshora vojaĝo ĝis nia celo. Tra la kupea fenestro ni rigardis la ĉarmajn dometojn. De malproksime ili ŝajnas ruĝaj skatoloj kun blankaj randoj meze de vastaj arbaroj aŭ ĉe l'bordo de lago.

Ĉe la alveno en Goteborg nin akceptis tre bonkore, kun tipe sveda trankvileco, kelkaj samideanoj. Taksie ni veturis hejmen. Kie kaj kia ĝi estas?

Dumvoje ni ofte timis pri akcidento. Ĉu nelerta ŝoforo gvidis nin? Ne, ne pro tio! Sed la maldekstra trafikotiel strange impresas, ke oni komence timas pri kolizioj.

Kiel agrable estos ripozi post 30 hora vojaĝo. La sekvan lagon ni rom tramigris nian kvartalon. Belaj larĝaj stratoj. Altaj, rigidaj domejoj. Ĉiufoje ili estas pleuplenaj. Tamen la sveda filmo, kiel celere la ĝenerala filmnivelo, estas tre kritikinda. Amuzon kaj distron la svedo tre ŝatas. Konataj ja estas la popolaj parkoj, kiuj prezentas ŝusperan distron.

Ni alvenis sur placo, kie kamparanoj vendas siajn varojn. Interese estas as, konstati la diferencan inter sveda kaj franca merkatoj. Ĝenerale la vendistoj ja kriis por atentigi la aĉetantojn. Sed ĉi tie, nenio tia. La vendistoj kvazaŭ atendas, ke la aĉetantoj venu kaj petu pri prezo. Ofte ili prezentas peceton por gustumi, ĉu pomon, piron aŭ fromaĝon.

Amuza estas la maniero mezuri la fruktojn. Oni havas kubajn skatolojn, laŭ grandecoj diversaj, unu, du aŭ kvin litraj. Do, se vi aĉetas dikajn pirojn aŭ terpomojn, vi ricevas nur tre malmulte. Kontraŭe, se etajn vi prenas, vi ricevas multe pli laŭ pezo. Dependas celere, kiamaniere, oni plenigas la lignan skatolon. Evidente la mezuro estas tre malpreciza sed ĝenerale oni aldonas iom por kompenso. Kaj ĉio tio okazas mirige trankvile. Kviete staradas la kamparanoj sur la placo. De tempo al tempo ili rifugas momenton en apudan kafejon por iom varmigi per taso da kafe. Kafe! Vere, sen tiu trinkajo la svedo ne estas imagebla.

Kiam vesperigas ili pakas siajn varojn kaj reiras al siaj lignaj dometoj, kie regas lia kvieto, per kiu la sveda vivo ŝajnas stampita.

ge-STUTT.

PRELUDO

(Je la momento kiam oni parolas pli ol iam pri rearmado, konfliktoj sanketoj, militoj, jen aktuala artikolo vere leginda.

Vi komprenos la devon kaj la idealon de la sinceraj samideanoj).

En la mallumo enpaŝis la artisto. Oni ne vidis lin, sed oni sentis lian ĉeston. La potenca fluído trakuris la publikon, kiam senbrue, per neaŭdebla kata paŝo li proksimiĝadis al la instrumento. Oni ne vidis lin, sed oni sentis. Jen li alfrasis. Jen li eksidas. Jen li metas la manojn sur la klavaron.

Kaj en la streĉa silento, kiam, retenante la spiron, ĉiu aŭdis nur la pulsadon de sia propra sango, aŭdigis la unua tono.

Ĝi estis unu sola tono. Kvazaŭ ne ligita al iu takto. Kvazaŭ tute aparta. Kaj tiel subita kaj forta, kvazaŭ la kordo ŝirigis kaj jetus en la spacon, kiel lastan adiaŭ-krion, tiun strangan, ŝiran sonon.

Sed ĝi ne estis kordoŝiro. Ĉar ripetigis la sama tono, ripetigis plurfoje, hake, akre.

La publiko miris.

Sed la artisto jam komencis la koncerton. Ie, en la plej malaltaj basoj, naskiĝis gamo obtuza, ŝajne malproksima, ŝajne eho de io, kio alproksimiĝas, alvenas...

La publiko aŭskultis senspire, sorĉita per tiuj minoraj tonoj, kiuj atingadis ĝin meze de la mallumo tiom pli minoraj, minacaj...

Gamo sekvis gamon. La pasaĝoj interplektadis sin, kelkfoje obtuze, aliffoje tondre, sed ĉiam pli rapide, ĉiam pli furioza, tiel, ke fine ĝi ne estis plu muziko, sed orgio de tonoj, kiuj, longe tenitaj en brido, senbridigis, elrompis sin kaj rulas sin tra la spaco, simila al ĉielaj ondoroj, ehigantaj miloble inter montaraj rokoj. Tondroj kaj uraganoj vetbalis en tiu stranga ludo. Oni kredus, ke ĝi ne estas la voĉo de fortepiano ke la artisto tuŝas la kordojn de la naturo mem, igas lin plori, ves hurli, igas lin uugi, tondri kaj teruri, kaj jetas tiun sovaĝan tonaron en la orelojn de la publiko.

Vere, lian koncerton oni neniam aŭdis antaŭe.

La atmosfero en la salonego fariĝis sufoka. Svitguloj kovris la fruntojn. Tie kaj tie aŭdigis nerva ekkrio de virino, sed tiuj superbruis ĝin la ĉiam plu furioza ludo.

Fine ĝi trapasis ĉiajn limojn. Ĝi ne

sonis plu en la spaco. Ĝi sonis en ĉiu homo, tondris sub la kranio, bategis en la koro, ŝaŭmis en la vejnoj, surdigis, premis, sufokis, teruris...

Vere, la artisto estis inspirita...

Fine oni ne povis elteni plu. Malesperaj voĉoj komencis voki pri lumo.

Kaj kiam malrapide, dormeme, kvazaŭ kontraŭvole eklumadis la lampoj, la okuloj de la publiko direktis sin al la estrado, por fine ekvidi la kaŝatan ĝis nun vizagon.

Sed ne tuj oni ŝis ekvidis. Ĉar la figuron de la artisto kovris nigra vualo, falanta de la kapo ĝis la piedoj kaj disfluanta sur la planko en ondosiĝantaj faldojn. Oni vidis nur, ke tiu figuro, klinita super la fortepiano kzazaŭ rabobesto super sia kaptajo estas neordinare alta kaj maldika.

Kaj ĉiam la lastaj ejoj de la ludo trasonis, rektigis tiu stranga figuro kaj per malrapide movo forjetis la vualon de la vizago.

Kaj tiam ĉiuj koroj cesis bati pro teruro. Ĉar tio ne estis homo. Tie, sur la estrado, volvita per nigra vualo, staris rikananta skeleto — la Morto mem — kaj montris al la homiloj sian ostan vizagon.

Ĝi turnis la kapon de unu flanko al la alia — jetis rigardon de siaj nigraj okulokavoj al tiuj, kluj palis en la unuavicaĝaj seĝoj kaj al tiuj, kiuj angore stertoris en la lastaj vicoj de la galerioj, ĝi etendis la blankajn ostojn de la manoj el la nigraj faldoj de sia vualo, kaj ree turnis sin al la fortepiano.

— Gesinjoroj — diris la Morto — mi ludis al vi nur la PRELUDON. Kaj nun ĉu vi volas aŭdi la KONCERTON...

Tiu preludo estis ludita en la jaroj 1914-1918... Ĉu ni aŭdos ankoraŭ — la koncerton ?

Lidja ZAMENHOF.

(el « Esperanto »
la bela revuo de U. E. A.)

UN FOYER ESPERANTISTE A PARIS

A une minute de la gare du nord et la gare de Pest, la S.F.P.E. (Société française pour la propagation de l'Espéranto) vient d'ouvrir, 34, rue de Chabrol, Paris X^{me}, un foyer comprenant salles de conférences, bureau d'informations, etc., ouvert tous les jours de la semaine de 14 heures à 18 h. 30 et où tous les espérantistes et sympathisants recevront le meilleur accueil et tous renseignements qu'ils peuvent désirer.

NI KANTU!

En ĉiu numero unu kanto

EN FOJNAMASETO

(laŭ la ario de « Auprès de ma blonde »)

1. Sen hejmo sen monero,
[libera sub ĉiel' (bis)]

Vagadas mi sur tero
[aŭ volo kaj sen cel'

Rek. En fojnamaseto,
[kiel bone bone bone,

En fojnamaseto, bone dormas mi.

2. Somere brilas suno
[dum vintro falas neg' (bis)]

Sed brilas, aŭ ne, luno,
[feliĉa kiel reĝ'

Rek.
3. Por ni blovelas vento,
[ondumas riveret' (bis)]

Por mi odoras mento
[ruĝiĝas pavet'

Rek.
4. Pli riĉa ol riculo
[ne ŝtelon timas mi (bis)]

Trezor' de vagemulo
[valoros nur por li.

Rek.

PROVERBOJ

Nur tiu ne eraras, kiu nenam ion faras
Kiu ne riskas, tiu ne gajnas

Apud plena mangotablo ĉiu estas tre
[afabla

Rostita kolombeto ne flugas en buŝeto
Kiu semas venton rikolto

[fulmotondron
Malsana stomako oreton ne havas

Por hundon dronigo, oni nomas ĝin
[rabia

Ne ĉio brilanta estas diamanto
[el Proverbaro de Zamenhof]

La leono kaj la rato

Laŭ via povo helpu al ĉiuj :
Vi ofte bezonos pli ol vi malgrandan.

Sub la piedojn de la leono
El tero malsaĝe eliris la rato.

La reĝo de Fbestoj, ĉe tiu okazo,
Kompata sin montris kaj lasis ĝin vivi,

Ĉi tiu bonfaro ne estis perdita,
Kvankam ne ŝajnas kredeble,

Ke al leono rat' povas helpi,
Sed elirinte el la arbaroj,

Ĉi tiu leono kaptiĝis en retoj,
Kiujn blekegoj ĝiaj ne povis.

Disrompi. La rato alkuras, la maŝojn
Mordetas kaj penadas, ke fine

La beston ĝi liberigas.
La paciencon kune kun tempo

Pli multe prosperas al for' kun kolero.

SUR LA FERVOJO

La fama Germana fervoja ministro Budde iam tagon vojaĝis de Berlino al Hamburgo en nefumista vagonara fako de la unua klaso.

La sinjoro eniris kaj tuj ekfumis cigaron.

« Pardonu, » sinjoro, diris ministro Budde, « ĉu vi scias, ke tiu ĉi estas nefumista fako ? »

« Ho jes, » respondis a sinjoro, sed daŭrigis fumadi.

Tiam ministro Budde eliris kaj transdonis sian vizitkarton, aldonante ke li estus devigata denunci la sinjoron ĉe la alveno en la proksima stacio, se li ne ĉesigus la fumadon. La sinjoro, leginte la karton, metis ĝin en sian poŝon kaj senĝenige daŭrigis fumadi.

Alveninte en Hamburgo, ministro Budde alvokis la staciestron kaj diris :

« Jen sinjoro, kiu fumis en nefumista fako kaj ne ĉesis fumi, kvankam mi atendigis lin pri lia legrompa ago. Komplezu noti lian nomon kaj adreson, por ke li estu punata. »

La estro tuj kuris post la jam forirantan sinjoron, sed baldaŭ revenis, dirante : — « Sinjoro, mi tre bedaŭras, ke ni ne povas ion fari entiu ĉi okazo, ĉar tiu sinjoro estas lia moŝto, la fervoja ministro Budde. Li donis al mi sian vizitkarton. »

FRANCA ESPERANTISTO

Tous nos abonnés ont reçu le N° de Décembre de cette belle revue mensuelle (ceux éventuellement onis peuvent nous le réclamer d'urgence).

En remerciement du grand nombre d'abonnements réunis dans le Nord, la SFPE a bien voulu nous accorder encore 40 abonnements supplémentaires à ½ tarif donc 8 fr. à adresser pour ceux ayant réglé leur abonnement à N. G. (y compris les esperantistes de Boulogne et de Dunkerque, ces 2 groupes abonnent systématiquement tous leurs membres).

Ceux n'ayant pas encore payé N. G. paieront donc 14 fr. pour les 2 gazettes qu'ils recevront séparément.

Dernier délai d'abonnement : 15 jours après la réception du présent N°.

ANEKDOTO

Kial vi ĉiam surhavas nur unu ganton ? Ĉu vi perdis la alian ? Tute ne, sed mi nur trovis unu.

NORVEGA HUMORO

Kiam mi estis ankoraŭ juna, ni havis maljunan, tre bonan pastron. Venis lia 70a naskiĝtago kaj la viroj decidigis, ke ili honoros lin per la donaco. Sed per kio oni farus al li la plej grandan ĝojon ? Jen la grava demando ! Kunvenis ĉiuj viroj de nia vilaĝeto. Oni proponis tion kaj alion, kaj fine ili decidigis, donaci al li barelon da vino. « Ĉiu el ni alportos kruĉon da plej bona vino la barelo estos plena », klarigis la vilaĝestro. La viroj konsentis.

Bone, ĉiu viro alportis kruĉon da vino kaj elverŝis ĝin en la barelon. Sed troviĝis inter ili ruzulo, kiu pensis, ke li povas ŝpari sian vinon ; kaj anstataŭ vinon li enverŝis puran akvon. Unu kruĉo da akvo inter kvardek kruĉoj da bonega vino... ! Tion ne ekkonos eĉ la pastro, kiu havas spertan langon. Tiel meditis nia ruzulo.

Bone. La vicoj venis al la pastro, petis lin, ke li ne rifuzu ilian modestan donacon... li ne rifuzis, havis grandan ĝojon kaj tuj invitis ilin trinki kun li po glaseto je lia sano.

Bone. Ili enigis en la barelon, kranon, sed—ho ve... ! el la barelo elfluis klara, pura akvo ! La ruzulo ne estis sola !

(el Lernolibro de Kilian)

NIAJ AMIKOJ EN LA KAZERNO

Sano Hnin estas en Metz. Hendriksen hazarde retrovis Delcourt en Villacoublay en la sama kompanio. Dewaele malfeliĉulo en Givet, Duvau-chelle sergento en Dunkerque kontribuis al la sukceso de la Zamenhofa festo. Ni tre deziras ricevi la adresojn de ĉiuj aliaj kiuj militservas portempe. Ni ne donacos al ili frandajn pakajojn ! sed per senpaga abono informos ilin pri la vivo de la grupoj en kiuj oni esperas revidi ilin plej baldaŭ.

KORESPONDANTOJ

Se vi deziras korespondi kun eksterlandano nepre indiku en via unua korespondajo vian agon kaj vian profesion aŭ okupon.

Ni volonte presos adresojn de seriozajn korespondantojn sed ne de kolektantoj (ekzistas specialaj gazetoj por ili).

PARGLAS LA DIREKTORO

Petante informon aldonu ĉiam adresitan koverton por la respondo.

Ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn skribu sur nur unu flanko de la folioj, lasante marginon, skribu tre legeble kaj maldense.

Sendu nur mallongajn artikolojn (maksimume du kolonoj). Interesajn artikolojn en franca lingvo ni tamen akceptas.

Pli vivanta estus la bulteno se redaktata de personoj el diversaj landoj. kara leganto petu de via eksterlanda korespondanto ke li sendu ion por tio : artikolon, anekdoton, maksimum... originalan aŭ tradukitan el sia lingvo.

Ni rekompencos ĉiujn valorajn sendojn kiel ni plezure faris nunmonate al f-ino Delattre en Boulogne-sur-Mer pro kies poezio ni tre gratulas. Ni ĝojas ke la premio « La vagabondo kantata » ravis ŝin.

Kiu konsentos fari por ni kelkajn tradukojn el franca esperanten ? de facilaj tekstoj ; eĉ se pro manko da tempo vi povos fari nur malmultajn. Ne timu ni ne postulas perfektecon la tradukajoj estas poste revizitaj.

Anoncu vin tuj, klarigante kiom da tempo vi povos dediĉi.

EKSTERLANDAJ LEGANTOJ !

Ni malfermas enketon : kiel aranĝi daŭrigan kurson post ĉe metoda kurso ? kaj ankaŭ : kion fari por konservi el la grupa vivo tiujn kiuj finis la lernado de la daŭrigaj kursoj ?

Ni jam ricevis interegajn respondojn kiujn ni publikigos.

Bonvolu la tre okupataj sekretarioj de grupoj kiuj legos ĉi tion, transdoni ĝin al malpli okupata kunlaboranto por respondo baldaŭ.

Peterkunlaboro de la plej viglaj grupoj povos multe efiki.

BIBLIOTHEQUE CIRCULANTE

M. Alglave, 150, rue Crotey Voyer, Blanc-Misseron (Nord) rappelle qu'il reste à la disposition de tous les isolés ou membres des groupes de la Fédération pour le service de prêts gratuits.

Kombista ĝentileco

La maljuna sinjoro : Ĉu vi havas ion ajn por la grizaj haroj ?

La konscienca kombisto : Nenion alian, estimata Sinjoro, krom la plej sincera respekto !

ORAJISTO

JUVELISTO

Georges MARGHT

9, rue Clemenceau

Tél. 1.074 DUNKERQUE

Rabato al niaj samideanoj

Hôtel du Cygne

— BOULOGNE-SUR-MER

10, rue des Pipots

Face la Place Dalton au centre de la ville

Tout confort :

Eau courante chaude et froide

Roydot-Delrue, Propriétaire

Téléphone 924

— GARAGE —

C. Boulogne 5189

HOTEL

Brasserie Liégeoise

Restaurant

8, rue Monsigny 8,

BOULOGNE-S/-MER

Paul MARMIN, Propriétaire

Télep. 0.99

HOTEL MEURICE

RESTAURANT

Prix fixe et à la carte

35, Rue Victor Hugo, 35

Boulogne-sur-Mer

Télep. 1.07

Les émissions **espérantistes**
de tous les Postes Européens
sont reçues avec
fidélité, sélectivité et pureté
par le **superinductance**

PHILIPS

Dépositaire officiel :

PETYT Frères & C^{ie}

54, r. Faidherbe, Boulogne/s/Mer

Télep. 0.54-0.99

LE MANTEAU
LA FOURRURE
LA ROBE
LE CHAPEAU

Le "grand chic"

3, rue Thiers, 3,

BOULOGNE-SUR-MER

Tél. 2.59

R. C. B. 5912

S. DARDIK

Tout pour l'élégance de la Femme
— et de la Fillette —

MIEL

DE LA FORÊT D'HESDIN

Pureté parfaite, goût très fin

Seaux fer blanc - 1 kg : 9 fr.

3 kg : 25 fr.

5 kg : 40 fr. — 10 kg : 80 fr.

Transport en plus.

— **Paiement après réception** —

H. DESMAREST, Instituteur
retraité à **Huby-Saint-Leu**, par
Hesdin (Pas-de-Calais).

— **ESPERANTISTE** —

UN RÉCEPTEUR DE QUALITÉ
EST TOUJOURS SIGNÉ



Agent Régional :

CARLIER

7, rue du Vieux Rempart

DUNKERQUE

Tél 1516

MAISON SADYN

3 et 5, rue du Lion d'Or
4 et 8, place du Palais de Justice

DUNKERQUE

Outillage - Fers - Métaux

Ménage - Chauffage

Article de Bâtiments

Le plus grand assortiment

Les plus bas prix

Tél. 729

Ad. LACROIX & Cie

VÊTEMENTS

BOULOGNE - SUR - MER

5, Grande-Rue 5,

Télep. 1.03

Mêmes Maisons : Calais, Dun-
kerque, St-Omer, Metz, Abbeville,
Le Havre, Douai, Lille, Cambrai,
Le Cateau, Amiens, St-Quentin,
Valenciennes, Maubeuge, Lens,
Roubaix, etc.

VINS

MILLON

Maison fondée en 1696

par **A. MILLON**

BOULOGNE-SUR-MER

Télep. 3.86

Oni korespondas Esperante.